Francilia federacio
KomitatKunsido (KK) 22/09/2023

Partopreno

- Raymonde Coquisart (RC) ĉeestas
- Pierre Gauthier (PG) vic-kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France ĉeestas
- Marc Giraud (MG) prezidanto ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aleks Kadar (AK) vic-sekretario senkulpigita
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ne ĉeestas
- Didier Loison (DL) kasisto ne ĉeestas
- Kévin Morel-Fourrier (KMF) ne ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers (LPI) sekretario ĉeestas
- Marianne Pierquin (MP) vic-prezidanto ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) senkulpigita

Ekde la antaŭa kunsido

- 09/06 okazis KomitatKunsido, la protokolo estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj
- 01/07 vizito de Julian Modest (akademiano aŭtoro de multaj libroj) en la sidejo. FLJ kaj LPI ĉeestis
- Komence de julio vizito de korea kvaropo, MG ĉiĉeronis
- 05/08 vizito de la Ĉina Ligo, neniu el la komitato renkontis ilin pro la UK
- 08/07 pikniko Place des Vosges : 18 partoprenantoj
- 12/08 pikniko apud la Tour Eiffel : 3 partoprenantoj
- 31/08 vizito de Edgar el Gvatemalo : Edgar lasis kelkajn etajn donacojn. Ĉeestis PG, LPI kaj Christian Legrand
- 02/09 Festo de asocioj en Paris Centre, en nia budo deĵoris DL, LPI kaj PG.
- 15-17/09 Homarfesto. Neniu budo pro manko de respondeculo. Ĉu iu informis Espéranto-France pri tio? AK ankoraŭ ne. Sed la kasisto de EF certe scias, ĉar neniu petis lin pagi por la budo. PG informos EF.

Eventoj

Malfermataj pordoj

23/09 de 14:00 ĝis 18:00. Organizas MG. Deĵorantoj: PG, AL

Estus bone prepari kaj anonci iun agadon, ekz ludo, prelego, kvizo, testo de nivelo (tio lasta troveblas en edukado.net)…

Estus bone noti sur paperan formularon la informojn de homoj: aliĝantoj al kurso, abonantoj al la dissendolisto.

Dank'al DJ niaj malfermataj pordoj enkadriĝas en "Fête des possibles"

https://fete-des-possibles.org/rdv/esperanto-langue-du-monde-portes-ouvertes/

Salon Linguafest

De 29/09 ĝis 01/10. Organizas DL.

La deĵortabelo estas tie https://framadate.org/G8wxhdyfBL3R7UrH

Kreata de la muzeo Mundolingua. Okazos en la Halle des blancs manteaux. Senpaga budo (sed vizitantoj devas pagi 5€ por eniri la eventejon). DL prizorgis la aliĝadon nome de Espéranto-France. ATENTU: mankas deĵorantoj. Estas nur po unu inter sabato ptm kaj dimanĉo matene.

Salon de l'Éducation

Salon de l'Éducation (https://salon-education.com) 15→19 novembre 2023, Paris, porte de Versailles. La prezo de budo por asocioj estas 1.000€ ht (1.200€ ttc). Ne urĝas aĉeti la budon, ĉar se oni mendas lastmomente la prezo malaltiĝos eble eĉ nuliĝos. EF povos mendi, kaj peti donacojn pri la budo, sed nur kiam estos respondeculo.

Kio plej gravas: kiu organizas? Neniu

Kiel trovi respondeculon de granda foiro?

Konstato: pli facilas trovi deĵorantojn ol respondeculon. AK: nu, ankaŭ deĵorantojn foje malfacilas trovi. Vd supre.

- Ĉu serĉi nur inter la komitatanoj? AK: laŭ mi, jes. Ĉiuj instruistoj kaj gvidantoj de aktivaĵoj estas en la komitato. Ni pripensu, kiujn indus venigi al la komitato. Vidu la tagorderon https://mensuel.framapad.org/p/kk20230922-a3b1#
- Kiuj estas la taskoj de respondeculo? Loĝistiko, komunikado, antaŭa organizado, surloka, fine raportado.
- Ĉu verŝajnas/eblas ke respondeculo ĉefe/nur organizas sed mem faras malmulton/nenion? Eventuale surloke, se estas sufiĉe da aktivuloj.
- Ĉu necesas antaŭe krei liston de eblaj kunlaborantoj? Jes, nepre.
- Ĉu specifaj aspektoj de kelkaj foiroj: bezono de veturilo por alporti la materialon, distanco de la sidejo, kolizio de datoj...? Jes, indus konsideri tiujn loĝistikajn aspektojn.

Asekuro de niaj eventoj

Prizorgas DL.

Preparado de la Membrokunsido 2024

- Varbado de novaj komitatanoj
- Serĉado de nova prezidanto kaj novaj estraranoj

Kursoj

Informoj

- cours pour débutants en présentiel, jeudi de 19h00 à 20h30, PG 1 lernanto
- cours intermédiaire en présentiel, mercredi de 18h30 à 20h, MP 1 ebla lernanto
- cours intermédiaire en ligne, vendredi de 18h00 à 19h30, MG 5 lernantoj
- cours supérieur en présentiel, mardi de 18h30 à 20h00, FLJ 3 lernantoj

La kursoj komenciĝos la 2an de oktobro.

Ĉiu instruisto bonvolu registri sian kurson en la retejon Edukado.net, la loko estu "Parizo", ne "Paris", kaj en Eventa Servo (komento ricevita dum la Eo-Kafejo, sabaton 16-an de septembro).

Ĉiu instruisto kreu kaj prizorgu la liston de siaj lernantoj.

Aliĝi al kurso

La malnovaj studentoj mem aliĝu rekte ĉe la instruisto

Novaj homoj povas aliĝi:

• dum la malfermitaj pordoj kaj LPI informos la instruiston se necese

• per mesaĝo al info@esperanto.paris kaj LPI informos la instruiston se necese

Pagi la kurson

Prezoj de la kursoj, por la tuta jaro 2023-2024, inkludante la kotizon al la asocio:

- surloka kurso: normala prezo 109€, malalta prezo por senimpostuloj 45€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 30€
- reta kurso: normala prezo 59€, malalta prezo por senimpostuloj 20€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 5€

La 2 unuaj kursoj estas senpagaj por novaj homoj, kiel provo. Poste, t.e. dum la 3a kurso, ĉiu instruisto devas peti de siaj lernantoj ke ili pagu por daŭrigi la kurson, kaj poste la instruisto devas kontroli ke ili tion faras (vi povas demandi al LPI aŭ DL aŭ Said ĉu iu lernanto aliĝis aŭ ne al Espéranto-France).

- surloka kurso: la studento devas pagi al la instruisto la kurson mem, kaj la instruisto devas doni al DL la pagon de la kurso, por la kaso de nia francilia asocio, nepre antaŭ decembro por ke li enkasigu ĝin antaŭ la jarfino. Krome, la studento devas aliĝi al Esperanto-France pagante ĝian kotizon, ĉu rete https://esperanto-france.org/adherer ĉu (lasante ĉekon) surloke pere de Said.
- reta kurso: la reta kurso mem estas senpaga. La francaj studentoj devas aliĝi al Esperanto-France pagante ĝian kotizon https://esperanto-france.org/adherer

Ĉu la kotizoj de la ĉeestaj kursoj inkluzivos la prezon de la lernolibro ? Alivorte, ĉu ĉiu kotizo por ĉeesta kurso pagos la aĉeton de la lernolibro ? MP skanos, PG proponos aĉeti, MG ne havas libron.

Kursoj ĉe SAT-Amikaro

Kursoj ĉe la pariza grupo de SAT-Amikaro boulevard Vincent Auriol kutime okazas posttagmeze, do ne estas konkurenco kun niaj vesperaj kursoj. Ni informu pri iliaj kursoj kaj petu ke ili informu pri la niaj. LPI prizorgos.

Reklami pri la kursoj

Ni reklamu en niaj kutimaj informkanaloj (vidu sube).

La bela kolora afiŝo farita de MP estis ĝisdatigita. FLJ povas alporti kelkajn ekzemplerojn.

- Unu ekzemplero estas afiŝita en la sidejo.
- Eblas alporti ekzemplerojn al la urbodomo por afiŝi en la surmurajn tabulojn pri asociaj agadoj. Kiu prizorgas? Neniu
- Se FLJ alportas plastitan ekzempleron, oni povos uzi ĝin en foiraj budoj.

ZamFesto

La Zamenhof Festo okazos la 16an de decembro posttagmeze, 19 rue Traversière, apud Gare de Lyon. Organizita de la fervojistoj.

Ni rapide diru al sylviane.lafargue@outlook.fr : nia federacio finance partoprenas ĝis 100€, ni deziras ke parto de la programo estu en Esperanto kaj ke la simbolo kaj nomo de nia asocio videblu sur la afiŝo, ni pretas prizorgi la bufedon. LPI respondos.

Kiu prizorgos la bufedon? eble DL kaj LPI

La fervojistoj petas nian opinion pri parto de la programo. "nous, on envisage le chanteur Jean-Manu (fils d'Isabelle Jacob) : son spectacle, vu au congrès de SAT-Amikaro à Bourges, donne des informations supplémentaires. Ses chansons sont très engagées mais, pour la Fête Zamenhof et aussi parce que dans les statuts de l'AFCE il est écrit "L'association est neutre à l'égard de toutes opinions philosophiques, politiques", les chansons proposées le 16 décembre devront être "tout public". Sa prestation peut durer jusqu'à 1 heure (maximum)." AK: Kiom kostus venigi kaj kantigi lin?

Por scii pli pri Jean-Manu:

https://www.youtube.com/watch?v=UVkrFH31Uv8 pri Esperanto

https://www.youtube.com/@jeanmanu/featured

Dum la SAT-Amikara kongreso li kantis kantojn, kelkajn en esperanto, la aliajn en la franca.

Ĉu iu parizano pretas fari ion en esperanto en la spektaklo? Ĝis nun neniu

Agrément Jeunesse Education Populaire

Esperanto France havas agrément JEP nacinivelan kaj petis ĝin lokanivelan nome de nia federacio. Prizorgas Christine Raiffaud c.raiffaud@wanadoo.fr

Projektoj

- Revigligi la junularan parizan movadon: 30/09 renkonto en Café Denfert de la junaj francilianoj pri ontaj agadoj (kaj aliaj) AL La gejunuloj havas 4 projektojn: krei instagraman konton (Lulu Tortue), rekrei unufoje la renkonton sabate en Denfert Café (Briac), organizi surlokan teman babilrondon sabate posttagmeze por gejunuloj (AL), reta prezentado de TEJO (Briac)

- JEFO. Okazis la ĜA, nova komitato, nova prezidanto Gabin, sekretario Jeanne, kasisto Julien. 52 membroj, inter ili 18 francilianoj.
- Klubo "Esperanto 94": ne plu aktivas. arĥivoj, estonto AL Multaj malnovaj libroj estos donacitaj al Esperanto France.
- Kontakti la mezlernejojn: GVN
- Kontakti la publikajn bibliotekojn kaj disdoni librojn: MP ne havas tempon
- Subglasoj: GVN
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "Place des arts"): DL, LPI
- Civitaj servistoj de Espéranto France: EoFr decidis ke ĝiaj civitaj servistoj dediĉos 6 horojn semajne al nia francilia federacio. Dume ili partoprenu kelkajn el niaj eventoj aŭ kursoj. Tial ni devos informi Espéranto France pri tiuj eventoj por ke Espéranto France enigu la eventojn en la laborkalendaron de siaj civitaj servistoj.

Respondeculoj pri agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Ekzamenoj: FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN
- Espéranto café croissant: GVN
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier, okazos lunde
- Prelegturneoj: FLJ

Notu bone 1a: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart@yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

Notu bone 2a: Michèle Abada-Simon pretas ĉeesti niajn eventojn, necesas informi ŝin antaŭe kaj rememorigi ŝin la tagon de la evento, ŝia telefononumero estas 09 54 02 85 12

Respondeculoj pri informkanaloj

La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook MG DL MP https://www.facebook.com/esperanto.paris
- X PG (AL) https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo MG DJ FLJ MP https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris
- Meet-Up DJ https://www.meetup.com/fr-FR/Esperanto-Paris/
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj DL

Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos 15/12/2023 je la 7a ptm, mikse.

FINO DE LA KK